

sub la suda kruco ★

ESPERANTO

Vizitu Nov-Zelandon!

Nova moralo por viaj genepoj

Vojaĝoj al Brunejo kaj Nepalo

Intervjuo de Penny Vos

Somerkursaro 2010 de AEA

Jarkongreso de NZEA en 2010

**Nov-Zelanda tagjurnalo raportas
pri Esperanto**

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 17[2] • numero 98 • junio 2009
ISSN 1038-9380

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

volumo 17 [2] • numero 98 • junio 2009

Redaktoroj | Chris Krügeloh & Ĝandor Monostori
Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au
P.O.Box 1097
Bendigo Central Vic 3552, Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".
Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15a de julio 2009

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2009, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralia

Sur la kovrilo: La *Champagne Pool* en la fama nov-zelanda urbo *Rotorua*.

Enhavo



4

Antaŭparolo



6

Vizito al la sudo de Nov-Zelando

8

Intervjuo de Penny Vos



10

Melburna "Epoko"

12

Hobarta scio-konkurso



16

Ĉu estas ĝemeloj en Azio?



18

Elefantoj en Nepalo



20

Nov-Zelanda tagjurnalo raportas pri Esperanto



22

Nova moralo por viaj genepoj



26

Raportoj el Esperantio

28

Leteroj el ESK

junio du mil naŭ

Antaŭparolo

La temo, kiun mi elektis por ĉi tiu eldono, estas *vojaĝi*, aŭ pli specife, *vojaĝi al Nov-Zelando*. Turismo estas unu de la plej grandaj mongajnantoj de la nov-zelanda ekonomio, kaj en ĉi tiu tempo de tutmonda ekonomia krizo estas eĉ pli necese reklami nian belan landon al eksterlandanoj. En ĉi tiu eldono, ni raportas pri vojaĝoj en Nov-Zelando, pri vizitoj de eksterlandaj esperantistoj al Nov-Zelando, kaj pri invito viziti al Nov-Zelando en la venonta jaro okaze de la jarkongreso de NZEA.

La kovra bildo montras la faman *Champagne Pool* en la geoterme tre alloga urbo *Rotorua*, en la norda insulo de Nov-Zelando. Tiu urbo estas sur la vojplano de multaj eksterlandaj turistoj, kiuj tie ankaŭ povas lerni multe pri la maoria kulturo. Ankaŭ por nov-zelandanoj, *Rotorua* estas alloga feria vizitloko. De Aŭklando, kie loĝas proksimume triono de la tutlanda popolo, nur estas trihora veturo per aŭto. Krom la geotermaj kaj kulturaj vidindaĵoj, la regiono de *Rotorua* ofertas multe da aventuraj distraĵoj kiel *sledging* (vidu la suban foton), tiel kiel la urbo ofte nomiĝas la *Queenstown de la Nordinsulo* (legu ankaŭ la artikolon pri *Queenstown* - la ĉefurbo de aventura kaj sporta turismo - en ĉi tiu eldono de ESK).

Bonan vojaĝon!

Chris Krägeloh

Ĉe la 2009a somerkursaro, multaj anoj de AEA diris ke ili ŝatus iom da angla en ESK, ekzemple dulingvaj foto-priskriboj, citaĵoj aŭ eĉ dulingvaj artikoloj. Do, pro tio vi vidos pli da angla en ĉi tiu eldono.

Sube: Chris Krägeloh subakviĝanta kaj sia edzino Anni re-aperanta per la helpo de la sledging gvidisto.



Kongreso de NZEA en 2010

La venonta kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) okazos en la ĉefurbo, Wellington, ekde la 26a ĝis la 29a de januaro 2010.

La kongresejo estas *Weir House*, bela loĝejo por universitataj studentoj apud la urbcentro. NZEA jam kongresis kelkfoje tie. La kongresejo estas tre taŭga kaj eblas mendí unu- aŭ du-personan dormĉambron ĉe *Weir House* por tranokti surloke dum la kongreso (vidu www.victoria.ac.nz/weirhouse).

Dum la kongreso okazos la oficiala jarkunveno de NZEA, prelegoj, distraĵoj, ekskursoj ktp. NZEA ankaŭ esperas venigi spertan bone konatan eksterlandan esperantiston por iom instrui aŭ/kaj prelegi.

Ĉiuj esperantistoj, precipe el eksterlando, estas bonvenaj al nia kongreso!

Pliaj detaloj pri kitozoj, programo, kaj nia eksterlanda instuisto aperos poste.



Phillie Carabianca | Everyphotojournal.com

NZEA congress in 2010

The next congress of the New Zealand Esperanto Association (NZEA) will take place in New Zealand's capital city, Wellington, from 26 to 29 January 2010.

The congress venue will be *Weir House*, a beautiful university student residence near the city centre. NZEA has already held a congress there several times before. The venue is very suitable for an Esperanto congress. It is possible to book rooms for one or two people, if you would like to stay on site (see www.victoria.ac.nz/weirhouse).

Included in the congress programme are the annual general meeting of NZEA, presentations, entertainment, excursions, etc. NZEA hopes to invite a well-known overseas Esperantist to give lessons and presentations.

Everyone interested in Esperanto, especially if you are from overseas, is very welcome!

More details about congress fees, the programme, and the overseas Esperanto teacher will be published soon.

Vizito al la sudo de Nov-Zelando

de David Ryan

Antaŭnelonge mi vizitis Queenstown en la suda parto de Nov-Zelando kun mia familio. Queenstown tiom impresis min ke mi ege volas propagandi pri ĝi.

Queenstown estas tre malgranda vilaĝo kun loĝantaro de malpli ol 15 000 personoj. Ĝi unue estis grava vilaĝo por ŝaffarmistoj, sed nun Queenstown estas la plej grava turisma loko en Nov-Zelando kun rektaj flugoj al/el aliaj urboj en Nov-Zelando kaj ankaŭ al/el Sydney, Melbourne, kaj Brisbane (dum la vintro). La internacia flughaveno estas moderna kaj antaŭnelonge pligrandigita. Surnape, Queenstown troviĝas okcidente de Dunedin ĉe la bordo de lago *Wakatipu* kaj je la piedo de la 'Sudaj Alpoj'.

Queenstown estas ĉirkaŭata de vintre neĝkovritaj montoj kaj, pro tio, ĝi havas faman nomon kiel la 'vintra sportloko de Nov-Zelando', ekzemple por tiuj, kiuj volas skii, montgrimpi, fiŝi, aŭ boati. Queenstown havas internacie konatajn golfejojn (la usona prezidanto Bill Clinton vizitis Queenstown por golfludi), kvinstelajn hotelojn, multajn trinkejojn kaj altkvalitajn restoraciojn, kaj tre belan lagon sur kiu eblas vojaĝi en mal-

nova vaporŝipo. Turistoj venas el multaj landoj kaj, pro tio, kvankam la oficiala loĝantaro estas malgranda, Queenstown estas granda kaj vere internacia vilaĝo. Ŝajnas ke nur junuloj el aliaj landoj (precipe Britio, Usono, Irlando, Kanado, Germanio kaj – strange – Brazilo) laboras tie en vendejoj kaj restoracioj. La tuta regiono de





"I fell in love with Queenstown. If you have never been there, I strongly recommend that you book a flight now. Queenstown is especially beautiful in the snow, although it is actually beautiful throughout the whole year."

Central Otago apud Queenstown estas tre bela, precipe dum aŭtuno kiam folioj falintaj el sur la arboj havas tre belajn kolorojn. La regiono estas nun pli konata pro la vino tie kultivata, precipe *pinot noir*. La apuda regiono ankaŭ estas historia parto de Nov-Zelando pro la fakto ke oni malkovris oron tie en la 19a jarcento kaj venis multaj homoj el diversaj mondpartoj. Ili lasis post si belajn vilaĝojn kiuj nun prosperas dank'al turismo kaj konstruaĵojn faritajn el ŝtono. Ĉinaj eksaj orserĉantoj ankaŭ lasis siajn dometojn tie. Estas facile imagi kiel malfacila estis la vivo por tiuj homoj antaŭ 150 jaroj.

Pro la beleco de la regiono kaj regulaj flugoj, multaj nov-zelandanoj ŝatas aĉeti ferian domon en Queenstown aŭ en la apuda regiono, kaj multaj nun translokiĝas tien el Auckland kaj aliaj urboj. Fakte, la meza domprezo en Queenstown estas nun sama kiel en Auckland!

Mi enamiĝis al Queenstown. Se vi ne konas ĝin, mi ege rekomendas ke vi mendu flugon nun. Queenstown belas precipe en vintra neĝo; tamen ĝi fakte belas tutjare. ★

Intervjuo de Penny Vos



de Katja Steele

Penny Vos ĉeestis la 41-an konferencon de la *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)* en Porto-Novo en Benino, Afriko, ekde 29 julio ĝis 5 aŭgusto 2008.

De kie venis la ideo vojaĝi al Afriko?

De Renato Corsetti, kun kiu mi korespondas pri diversaj projektoj, inter alie pri kiel plibonigi la vivkondiĉojn kaj la edukadon en la tria mondo kaj kian rolon en tio povus havi Esperanto. Mi volis ankaŭ viziti mian amikon kaj kunlaboranton, Mechak EZIN, kiu loĝas ĝuste en Benino. Kaj ne laste - estante sekciestro de *ILEI* Aŭstralio ĝenis min, ke mi neniam partoprenis *ILEI* konferencon. Do nun mi faris tion.

Kiu estas Mechak?

Li estas juna esperantisto, kun kiu mi komencis etan projekton por longdaŭra helpado al afrikanoj. Ni esploras la eblan provizon de pura akvo, faradon de fornoj kaj la eblon starigi lingvajn klasojn por virinoj kaj infanoj. Nia retejo (www.mondisto.com) estas momente nur en la angla, sed estonte ni intencas uzi ankaŭ Esperanton, la francan kaj la lokan dialekton idaĉan. Ĝis nun ni estas nur en la komenca stadio de la projekto.

Kiajn impresojn lasis en vi la lando kaj la homoj en Benino?

La lando estis verda, diversa kaj fruktodona, la ŝtonegmontoj estis belegaj, la urba aero tro malpura kaj la homoj diligentaj, familiemaj kaj humilaj. Ĉiuj estis amikaj kaj helpemaj. Afriko (aparte ĝia franclingva parto) soifas pri kontakteblecoj kun la ekstera mondo, do la Esperanto-instruado tie estas limigita nur de mono, ne de intereso.

Ĉu vi kontentis pri la loĝkondiĉoj dum la konferenco, pri la manĝoj ktp?

La konferencejo estis la tre alloga kaj interesa *Songhai-Centro*, kiu estas kaj gastejo kaj bieno kaj lernejo pri interkonektita agrikulturo. Surloke estas produktataj legomoj kaj ĉius-

pecaj fruktoj, porkoj, fiŝoj, kokoj, ovoj, ŝapo, suko, fungoj, nuksoj kaj akvopurigiloj. Volontuloj kaj studentoj faras la laboron kaj la gastoj provizas monon por subteni la lernadon. Tiel la centro plibonigas la spertojn kaj elektojn de farmbienistoj el ĉiuj landoj de Okcidenta Afriko. Bonega afero!

Ĉu ĉeestis multaj afrikanoj?

Jes, proksimume duono de la kongresanoj estis afrikanoj, plej multe junaj kaj viraj. Nur du afrikaj virinoj partoprenis, sed ni kontaktis aliajn esperantistojn post la konferenco, en riĝejoj. Ni renkontis instruemulojn de vaste malsamaj spertoj.

Kiuj estis la plej memorindaj prelegoj-aranĝoj pri la ĉeftemo: Instruistoj de Esperanto por la planedo Tero?

Kunlaborado sub la gvidado de Jean-Pierre Boulet, por krei libretojn pri nutrado per vitaminoj, por virinoj kiuj ĵus lernis kiel legi.

Vi pripensis akcepti en Benino laborpostenon. Pri kio temis?

Mi serĉis informon pri la *International Bacchalaureate* interrete por GBEGLO Koffi dum nia vizito al la *Instituto Zamenhof* en Togolando. Tie mi trovis reklamon de posteno ĉe la brita lernejo de *Lome*. Ni vizitis la lernejon kaj mi estis invitita komenci labori post du tagoj. Ĝi estis tre bela kaj havis tre agrablajn etosojn sed mi decidis ke mi ankoraŭ havas respondecojn tie.

Kio estis aparte inspira por via estonta laboro por Esperanto?

Komparto por afrikaj infanoj estas ke ili lernas en siaj hejmoj proprajn afrikajn lingvojn, sed kiam ili alvenas en la lernejon, ili rajtas paroli nur la francan. Ili uzas la afrikajn lingvojn dum sia tuta vivo sed neniam lernas skribi kaj legi ilin ĉar ili estas tro okupataj por lerni la francan. Ĝuste pro tio ni decidis prepari etan, simplan kaj malmultekostan legolibron por la infanoj en la idaa lingvo kaj Esperanto. Ĝia kroma interesaĵo estos la surloke faritaj ilustraĵoj, kiuj prezentos ne la kutimajn eŭropajn plantojn, aĵojn, manĝaĵojn ktp, sed tiujn de la afrika medio. La legolibretojn ricevos la lernejo en la vilaĝo de *Mechak*, sed ni esperas ke ili uzeblas ankaŭ por aliaj projektoj, ekz. *Lingvolanĉilo*.

Kaj rilate al Aŭstralio?

Mia estonta laboro estas konvinki la aŭstralian registaron ke Esperanto estas la plej taŭga kaj efika lingvo por bazlernejoj. Instruata de normalaj bazlernejaj instruistoj ĝi donos al infanoj ŝancon esti vere dulingvaj kaj ĝui la plej vastan interkulturan edukadon eblan.

Instancoj en Usono kaj Britio agnoskas similajn problemojn kiel ni en Aŭstralio, kaj ili certe interesiĝos pri nia solvo, kiam ni montros ĝin. Post tio Esperanto estos pli kaj pli kredebla alternativo al koloniaj lingvoj. ★

Melburna epoko

Vizito de ĵurnalistino de la gazeto "Age" (Epoko)

de Kam Lee

Mardvesperon, la 26an de septembro 2008, Vanessa Murray, ĵurnalistino de la gazeto *Age* (Esperante *epoko*) vizitis la melburnan kafklubon en la biblioteko de la melburna magistrato, 253 Flinders Strateto, Melburno. Ŝi deziris verki artikolon pri la kulturo kaj menciindaj aspektoj de la Esperanta komunumo en Melburno. Unu el ŝiaj celoj estis gajni informon kaj



Maldekstre al dekstre: Vanessa (ĵurnalistino), Miranda kaj Richard.

fari komparojn inter diversaj grupoj.

Ĉiu en la kafgrupo sin prezentis al la vizitanto kaj respondis al ŝiaj demandoj. La demandoj temis ĉefe pri gravaj Esperantaj travivaĵoj de la ĉeestantoj.

Ŝi demandis min, ĉu mi uzis Esperanton por veturi ekster Aŭstralio? Mi diris ankoraŭ ne, sed eble en la estonteco. Unu el miaj projektoj estas atingi la kapablon verki kantlirikojn en Esperanto. Miranda kaj aliaj menciis la rolon de AEA.

Esperanto estis parolata dum la diskuto, do la ĵurnalistino havis la oportunon aŭskulti la sonon de la internacia lingvo. Ŝi eĉ lernis kelkajn frazojn. Ŝi ankaŭ fotis kelkajn esperantis-tojn por la publikado de sia artikolo. Kelkaj el la grupo inkluzive min surhavis Esperantan T-ĉemizon kaj ni fotiĝis en la kafejo *Journal* post la leciono.

Ŝi demandis ĉu Esperanto estas lerninda lingvo. Ŝi opiniis ke nuntempe la angla estas tre mondrega lingvo. Mi emfazis du ĉefajn vidpunktojn. Bazita laŭ procento de popularo, la plej multaj homoj en la mondo parolas la ĉinan, dua estas la barata kaj tria la angla. Oni povas argumenti, ke la nombro de la neangla-devenaj parolantoj de la angla estas pli

granda ol la neĉina-devenaj parolantoj de la ĉina kaj tiel plu. Tamen, oni povas konkludi ke, kvankam la angla lingvo tre gravas por internacia komunikado, homoj kiuj scias du aŭ pli da lingvoj havas avantaĝon kompare al homoj, kiuj parolas nur la anglan.



Fotisto: Alan Bishop

Andrew, Vanessa, Kam kaj Miranda

La ĵurnalistino ankaŭ demandis min ĉu Esperanto estas tro influita de la eŭropaj lingvoj? Mi respondis ke Zamenhof sciis bone multajn eŭropajn lingvojn. Se li sciintus la ĉinan aŭ araban lingvojn kaj tiel plu, eble li aldonintus tiajn lingvojn al la Esperanto-vortstoko. Dum la komenco de la historio de Esperanto, la politika subteno de Esperanto en Eŭropo estis sufiĉe forta, ĉefe pro la fakto ke la vortstoko estis plejparte eŭropdevena. Tamen, lingvoj

evoluas, la vortstoko povas pli-grandiĝi, Esperanto nun povas travivi per si mem, kaj do la plia uzado de neeŭropaj vortoj povas okazi. ★



Fotisto: Kam Lee

Jenny (maldekstre) respondas al la demandoj de la ĵurnalistino (dekstre) dum trinkpaŭzo.



Hobarta scio- konkurso

de Kam Lee

La hobarta scio-konkurso estas evento, kiu komenciĝis antaŭ dek jaroj en *Republika Hotel*, kaj okazas dum la dua kaj kvara lundo de la monato. Ironie la konstruaĵo estis antaŭe nomita *Empire Hotel*.

La grupo de Robert Budzul estas nomita *Esperanto*, kaj ĝi komencis partopreni dum la komenco de 2008. London, la 27an de oktobro 2008, mi estis en la grupo "Esperanto". Ĉiu en la grupo devas pagi 2 dolarojn por partopreni en la konkurso. Pasintan semajnon, ili gajnis la duan premion, kiu estis 58 dolaroj! Proksimume 20 grupoj konkursis kaj la plej grandaj grupoj enhavas proksimume dek homojn.

La konkurso konsistas de kvin aroj de dek demandoj. Post ĉiu aro de dek demandoj, estis laŭparolata tasko de ĉiu grupo, kaj pro tio Esperanto estas aŭskultita de la partoprenantoj. De tempo al tempo, grupo ne donas eĉ unu ĝustan respondon dum etapo, sed kiel konsolo, ili gajnis botelon de alkoholaĵo.

Jen ekzemploj de demandoj:

Kiu estas la nomo de la planedo kiu havas la kvar satelitojn *Miranda*, *Ariel*, *Umbriel* kaj *Oberon*?



La Sciplena Esperanto Teamo - The Knowledgeable Esperanto Team
 Maldekstre al dekstre: Maria, Carol, Belinda, Robert, Wayne (staranta), Natelie, Neil (staranta), Sally, Penny kaj Lisa.

Antaŭ ol ni respondis ĉi tiun demandon, ni pensis ke eble la kvizkontrolisto prezentis trompdemandaron. Tre multaj artefaritaj satelitoj nun veturas ĉirkaŭ la tero, ĉu ne? Finfine, ni elektis *neptunon*, sed fakte la ĝusta respondo estis *urano*.

Kiu estas la nomo de planto kiu akre kriegas je alta tonalto dum ĝi estas tiritita el la tero?

La respondo estas mandragoro (angle *mandrake*). Bagatela rilata fakto estas, ke kriegaj mandragoroj okazis en la dua *Harry Potter* filmo *Ĉambro de Sekretoj*. Harry kaj siaj amikoj devis vestigi orelejojn dum la eltirado el la tero de la mandragoroj, kies suko resanigas homojn paralizitajn pro specifa malbona sorĉo.

Je la fino de la konkurso, ni ĝuste respondis multajn demandojn, babilis kaj trinkis/drinkis. Estis ĝoja vespero. Du semajnojn poste, la grupo konkursis kaj gajnis la duan premion. Gratulon al la kvizgrupo! ★

Ekskurso en Hobarto

de Kam Lee

Dimanĉmatrne, la 26an oktobron de 2008, grupo de esperantistoj renkontis ĉe *Constitution Dock*, Hobarto, ĉe ŝtona monumento, kiu rememorigas la unuan konstantan koloniaĵon de Tasmanio. Hobarto, establita en 1804, estas la dua plej malnova urbo en Aŭstralio kaj estis nomita en honoro de *Lord Hobart*, kiu tiutempe estis la brita sekretario de kolonioj. Tri el la multaj videndaĵoj en ĉi tiu historie riĉa loko estas *Art Hotel*, la ŝipo *May Queen*, kaj *Salamanca Place*.

Art Hotel estas relative nova kaj estas parto de *IXL* konfitaĵfabriko, kiu estis fermita dum multaj jaroj. Malgraŭ la renovigadoj kaj redekoracioj, multaj el ĝiaj historiaj trajtoj estas konservitaj. Grandega spaco estas malfermita al la ĝenerala publiko, kaj oni povas manĝi en tiea restoracio. Multaj jaroj antaŭe la alia parto de la fabriko fariĝis artlernejo.

Maldekstre al dekstre: Robert, Kam, Paul, Tim kaj Dianne.



Laboro sur la ŝipo *May Queen*. Anstataŭ prezenti konvencian grupfoton, ni decidis prezenti alian pli viglan aspekton.

Unua vico maldekstre al dekstre: Jenny, Miranda kaj Hazel.

Dua vico Maldekstre al dekstre: Tim kaj Kam.



Dum ni piediris ĉe *Constitution Dock*, ni rigardis la lignan velŝipon, la *May Queen*, kiu aĝas pli ol 100 jarojn. La ĉefa rolo estis porti segitan lignon, trajnŝpalojn kaj de tempo al tempo karbon, ŝtonon, pomojn, pirojn kaj aliajn fruktojn. Mi surpriziĝis, ke oni permesis al ni supreniri la akvoveturilon. Do komenciĝis interesa ekskurso.

Poste ni piediris tra *Salamanca Place*. Notinde por mi estis parto, kiu estis antaŭe surfaca minejo kaj estis malfermita dum multaj jaroj. Ĉi tiu parto nun estis ŝanĝita al komerca loko por kafejoj, butikoj, apartamentoj kaj publika placo, kiu enhavas belan fontanon.

Konklude, la loko estas tre interesa, kaj oni devas danki Robert Budzul pro lia interesa ĉiĉeronado al la Esperanto-grupo ĉe *Constitution Dock* kaj la ĉirkaŭaĵo. ★

Ĉu estas ĝemeloj en Azio?

de David Ryan

En oktobro 2008 mi vizitis Brunejon kaj Tajlandon kun mia familio (edzino kaj 6-jaraj ĝemelinoj). Mi ne intencas skribi multon pri Tajlando ĉar mi imagas ke multaj legantoj de *ESK* jam konas tiun landon. Male, Brunejo estas lando ne bone konata al multaj homoj en Nov-Zelando aŭ Aŭstralio.

Ni flugis per *Royal Brunei Airlines* kiu ofertas ĉiutagan flugon el Aŭklando aŭ Brisbano. Tiu flugkompanio estas sufiĉe malmultekosta sed komforta kaj, alveninte en Brunejo, eblas pluflugi al multaj aliaj landoj en Azio kaj eĉ Londono je tre bona prezo. Brunejo estas islama lando kaj, pro tio, ne haveblas alkoholaĵoj en *Royal Brunei Airlines*. Ankaŭ, antaŭ ol la aviadilo enaeriĝas, oni aŭdigas al pasaĝeroj islaman preĝon. Mi ne komprenis ĝin sed mi imagas ke la preĝo estis por peti bonan vojaĝon!

Brunejo, en la insulo de Borneo, estas sufiĉe malgranda lando. Pluvarbaro kovras proksimume 90% de la lando kaj, pro tio, ĝi estas tre vizitinda lando por natur-amantoj. La ĉefurbo nomiĝas Bandar Seri Begawan (Bandar) kun proksimume 80 000 loĝantoj el tuta nacia loĝantaro de 300 000. En Bandar eblas viziti tre belajn moskeojn, muzeojn

ktp, kaj vojaĝi boate en la haveno. La plej vizitinda loko estas la flotanta vilaĝo kie loĝas 30 000 personoj en domoj konstruitaj super la akvo de la haveno. Tamen, krom domoj estas ankaŭ lernejoj, hospitaloj, butikoj ktp – vera super-akva vilaĝo.

La plejmultaj brunejanoj apartenas el la malaja etno kaj la nacia lingvo estas la malaja. Tamen, oni instruas la araban en lernejoj kaj videblas multaj afiŝoj kaj stratindikiloj ktp en la araba skribmaniero. Pro



Supre: David Ryan kun edzino kaj ĝemelinoj en domo de Brunejano.

Above: David Ryan with his wife and twin daughters in the house of a local.

petrolo Brunejo estas sufiĉe riĉa lando. La ŝoseoj estas tre modernaj kaj ĉie videblas novaj domoj kaj grandaj konstruaĵoj (registaraj oficejoj, universitato ktp).

Ĉu indas viziti Brunejon? Certe jes por natur-amantoj. Mi ankaŭ rekomendas ĝin por kiuj volas halti dum 2-3 tagoj survoje al Azio aŭ Londono. Eblas resti ĉe luksa nemulte-kosta hotelo kaj naĝi la tutan tagon sub varma suno. Ni ne vidis grandan amason da turistoj en Bandar; la plejmultaj venis el Malajzio, Indonezio, Ĉinio, kaj Japanio.

Post Brunejo, ni enaviadiliĝis por flugi al Tajlando kie ni vizitis la ĉefurbon kaj ankaŭ marbordan turistvilaĝon.

Do, kial nomiĝas mia artikolo tiel? En Brunejo kaj Tajlando ĉie ĉiuj, vidinte niajn filinojn, demandis "ĉu ĝemelinoj?" Oni ofte faras al ni tiun demandon en Nov-Zelando, sed multe pli ofte en Brunejo kaj Tajlando, kvazaŭ ne estus ĝemeloj en tiuj landoj. Eble ĝemeloj ne tiel oftas tie. *Kompare kun nov-zelandanoj, mi rimarkis ke brunej- kaj tajlandanoj ege amas infanojn. Policistoj, doganistoj, vendistoj, kelneroj ktp ĉiuj ridetis kaj volis saluti al niaj ĝemelinoj.* ★




Supre: Celina Ryan, edzino de David, ekster granda moskeo en la ĉefurbo.

Above: Celina Ryan, David's wife, outside an impressive mosque in the capital city.

Elefantoj en Nepalo

de Miranda Lutz



Dum februaro ĉi-jare mi vizitis belegan lokon en Nepalo - la *Chitwan* [Ĉitŭan] nacian parkon. La parko havas 932 m², kaj situas en la sud-meza parto de Nepalo, proksimume 6 horojn per aŭtobuso de la ĉefurbo Katmanduo. Ekde la malfermo en 1973 multaj turistoj vizitis la mondfaman lokon. Ĝi estas fama pro kelkaj specoj de bestoj: la unukorna rinocero, la bengala tigro, krokodiloj, rivera delfeno, kaj mia plej ŝatata, la barata elefanto! Kiam oni vizitas la lokon estas kelkaj agadoj farindaj kaj jen kelkaj fotoj de ili.

Ĉe la elefanta bredada centro kie oni povas vidi tre rarajn elefantajn ĝemelojn (4 monataĝa en la supra foto), kaj eĉ tuŝi elefanton se vi (kaj ĝi!) kuraĝas!



"Ĉe la elefanta bredada centro oni povas vidi tre rarajn elefantajn ĝemelojn"

"At the elephant breeding centre in Nepal, you can see very rare elephant twins"

Rajdante elefanton oni povas esplori la proksiman ĝangalon... kaj riveron.



Oni povas helpi la trejnistojn bani la elefantojn... aŭ ĉu ili banas vin? ★




Nov-Zelanda tagĵurnalo raportas pri Esperanto

En marto aperis tri-paĝa artikolo pri Esperanto en la sabata eldono *Canvas* de la ĉefa tagĵurnalo de Nov-Zelando, *New Zealand Herald*, kiu kutime havas proksimume 400 000 legantojn.

En la artikolo aperis belaj fotoj de tri esperantistoj kiuj partoprenis la someran kurson en Sydney: Vicky Crickett leganta libron kun sia juna filo, David Ryan kun siaj ĝemelinoj, kaj Rouan van Ryn.




La artikolo estis ĝenerale favora pri Esperanto kaj menciis ke lastatempe en Nov-Zelando la membraro de NZEA iom kreskis. Por NZEA la artikolo estis granda senpaga propaganda sukceso pro la fakto ke nun miloj da nov-zelandanoj scias pri Esperanto.



GROUNDWELL: Attracted to Esperanto as a teenager, Vicki Crickitt says acceptance needs to begin with an emerging generation, and so is teaching her son Quinn, 5.

Once pegged as the language that would take over the world, Esperanto seems to be struggling. **SHELLEY BRIDGEMAN** asks why the universal second language that promised so much has so far failed to achieve critical mass popularity



McDonald immediately understood the concept. "I became a baby! Not at the same time I said, 'You going to learn this language Esperanto?'"

McDonald had struggled with languages at school and was seduced by Esperanto's user-friendly reputation. "If Esperanto is the easiest language, surely that's the one to go for," he says. Now 16, he read *Me, Her, a Fluent Speaker and a Believer in Its Core Principles*, what aficionados call *la interna libro* or the internal idea — the notion of building down precisely that is recognized within the language.

A member of the Universal Esperanto Association, McDonald believes it could be too long before an organization that matters, perhaps even the United Nations, awards Esperanto the status and recognition he thinks it deserves.

He also believes the internet, with its online content and social networking sites,

PHILOSOPHY: Roman van Ryn began learning Esperanto as a linguistics student.

will draw in young people to the cause.

He thinks that "necessary evil" for the language is missing from club nights these days. "We used to sing what was called the Esperanto hymn at the anthem. There was always a feeling of religiosity about it," he says. "It just lay flat against."

Below Esperanto's success, Jani Proux was 12 when an accident robbed him of his strength. Unable to participate in the outdoor activities he'd previously enjoyed as a boy growing up in Montreal and because his father was an Esperantist, he found himself drawn to the language — with the aid of Beville. While studying physiotherapy in London, Proux attended regular Friday night sessions of the local Esperanto club where the state of the

language in Romania, Africa or Thailand or Portugal would be shared over tea and cake.

Proux, now 19 and living in West Auckland, admits he did not know Esperanto for a time before the club but had to be part of a conversation at least again. Esperanto's theme with a shared common interest following a long time.

He still remembers all the time spent with which Esperanto can be learned. "Within 30 seconds you would know all the names — the present, the future and the past," he says, adding that it could take two years to grasp the nuances of the French language.

"With Esperanto, there are no irregularities whatsoever. From a grammatical point of view it's perfect from a logic point of view it's perfect," he says. "It is so perfect as a language in going to be I speak a number of languages, but Esperanto is special. If it wasn't for the club, I wouldn't be bothered with it."

—*Shelley Bridgeman, Vicki Crickitt*

⚡ THERE ARE NO IRREGULARITIES WHATSOEVER. FROM A GRAMMATICAL POINT OF VIEW IT'S PERFECT. FROM A LOGIC POINT OF VIEW IT'S PERFECT. ♪

Animaciajn filmojn en Esperanto mi volas fari.

Tiucele mi studas animacion ĉi-jare ĉe filma lernejo. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj (kaj instruistoj) ke ja ekzistas homoj tutmonde kiuj volas vidi novajn animaciajn filmojn en Esperanto.

Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi ĉe la jena adreso:

Simmon Keith Barney
1111 Pacific St, # 407
Vancouver, BC
V6E 3X7
CANADA

Nova moralo por viaj genepoj

de Yvan Serve

Kvankam tiu titolo ne vere taŭgas, mi ne trovis alian pli bonan por elvoki tiel gravegan aferon ke necesus, laŭ mi, plurfaka teamo, ekonomistoj, sociologoj, filozofoj, ekoloĝoj ktp por studi kaj poste eldoni la neprajn konsekventajn, ĝisfundajn ŝanĝojn al nia vivmaniero. Per tiu skribaĵo mi provos klarigi mian penson, esperante estigi vian scivolemon kaj cerbumadon pri ĉi tiu temo. Jen mi klarigu du vortojn el la titolo.

Unue kiam mi parolas pri viaj genepoj, mi alparolas junajn gefratojn kies genepoj ankoraŭ ne naskiĝis. La jam naskiĝintaj genepoj de geavoj tiel aĝaj kiel mi estas jam tro implikitaj en la socio de senlima konsumado. La nova moralo celas venontajn generaciojn. Due ne temas ĉi tie pri kutimaj moraloj difinitaj de religioj aŭ leĝoj. Mi ŝatis aŭdi antaŭ ne longe la filozofon Luc Ferry diri "esence, la tuta moralo estas respekti aliajn". Nuntempe la problemoj estas scii kiuj estas la aliaj. Pro tro granda surtera loĝantaro, facilaj vojaĝoj, tutmonda ekonomio, la aliaj ne plu estas la proksimuloj aŭ la samlandanoj sed ĉiuj vivantaj homoj sur tero.

Iu ajn scias ke la karbondioksido elspirata de niaj veturiloj minacas estigi mortigajn inundojn en Azio kaj subakvigi multajn atolojn en Pacifika aŭ Hinda Oceanoj kaj estigi senpluvecon en Aŭstralio kaj Afriko kaj ankaŭ uraganojn en la Meksika Golfo. Tamen ĉiu usonano produktas jare 6 tunojn da karbondioksido dum eŭropano forĵetas 2 tunojn kaj baratano 0,5 tunojn. Sed ĉu ĉiu scias ke resursoj de ĉiuj krudaj materialoj malpliigas alarmante? Ĉu vi scias ke Usono konsumas unu kvaronon de la tutmonda nafto, kaj ke ĉiu usonano foruzas 600 litrojn da akvo tage? Nu jam ne restas pli ol 8000 m³ por ĉiu terloĝanto. La tutaj resursoj de la tero, metaloj, ligno kaj eĉ nutraĵoj baldaŭ mankos. Jen kelkaj ciferoj pere de Jacques Attali. Ekde la komenco de la 18a jarcento konsumo el naturaj resursoj tridekobligis. Dum la lastaj 40 jaroj la konsumo de tiuj naturaj resursoj triobligis. Laŭ la aktuala ritmo la resursoj de tergaso ne daŭros pli ol 70 jarojn, de nafto ne pli ol 50 jarojn. Laŭ la aktuala ritmo post 40 jaroj arbaroj forestos, krom en Eŭropo kaj Nordameriko. Eĉ pli grave - ĉiujare 5 milionoj

"La nova moralo celas venontajn generaciojn."

da hektaroj de kulturebla tero malaperas pro urbanizpremo. Nu necesos duobligi la agrikulturan produkton antaŭ 2050 por nutri la tiaman teran loĝantaron.

Dume, estraranoj nin trankviligas dirante ke la homara genio eltrovos solvojn antaŭ ol tro malfruos. Ili parolas pri renovigeblaj energioj, pri biokarburajoj, pri salakvumitaj kreskaĵoj, kaj aliaj mirindaj elpensajoj. Ĉiel ili mensogas al konsumantoj, ruinigantoj kaj poluantoj kiel ni. Ĉar krom la suna kaj eble la venta ĉiuj energioj ne estas senfine renovigeblaj. La necesaj plantejoj por anstataŭi ĉiujn karburajojn per biodizelo aŭ etanolo ne lasus sufiĉe da kultivteroj por la nutraĵproduktoj. Konvinkas nin nura nombro: por plenumi la karburujon de kvarmotorrada veturilo per 95 litroj necesas transformi 205 kg da maizo t.e. sufiĉaj kalorioj por nutri unu homon jare. Unuvorte ĉiuj alternativaj proponitaj solvoj estas nur marĝenaj rimedoj nekapeblaj solvi la tutan problemon.

Estas eĉ pli grava mensogo kredigi homojn en subevoluintaj landoj, ke ili povos iam trafi la saman vivnivelon kiel okcidentanoj. Ĉar fakte la resursoj de la tuta tero ne sufiĉos. Mi jam scias vian demandon: kion fari?

Vere estas ke ŝtatestroj mem ne kapablas ŝanĝi la ekonomian evoluon de siaj ŝtatoj. Grandegaj transŝtataj kompanioj kaptas kaj orientas la merkatojn. Eĉ la kompaniestroj mem ne povas ŝanĝi la evoluon de siaj firmaoj. Akciuloj kaj ĉefe administrantoj por pensifondusoj postulas pli kaj pli da tuja profito eĉ kiam tio estas kontraŭ la estonta bonstato de tiaj kompanioj. Ĉiuj forkuras antaŭen. Oni devas produkti pli kaj pli, do proponi produktaĵojn kiuj ne daŭros longe. Tiu gadĝetrego de nereuzeblaj varoj faras ke eĉ ekiparo daŭras laŭmode ne pli ol someraj vestaĵoj. Post du jaroj komputilo estas taksita tro malnova, apenaŭ nova aŭtomodelo eliras la fabrikon, oni nepre ĝin volas aĉeti. Orgojla simontro, trompa aspekto, blufi nun regas.

Do, kion fari? Unue ni rifuzu esti nur konsumantoj, blinde obei televidreklamojn, esti hipnotizitaj de merkato. Kaj ni refuzu disperdi varojn. Ĉu vi scias ke en Francio la duono de la taga panprodukto estas forĵetita, ĉar la moda pano malmoliĝas 12 horoj post la elbakejigo kaj ne plu estas manĝebla? Ni ankaŭ ŝparu akvon kaj energion malŝaltante neutilajn lumigilojn. Ni veterizolu niajn domojn, ĝeneraligi sunajn akvohejtilojn, uzi publikajn transportojn ktp. Sed tiuj agadoj ne sufiĉos.

Ni konsentu fiere stiri la saman aŭton, uzi la samajn televidilon kaj lavmaŝinon dum pluraj jaroj, despli ke la allogaj proponitaj plibonegoj ofte estas iluziaj. Ni devas postuli ke fabrikantoj produktu simplajn kaj ripareblajn aparatojn, maŝinojn, dum tute male ili organizas la mankon de vicpecoj por la malnovaj modeloj. Ankaŭ ni fieru preferi posedi nur kelkajn vestojn same kiel niaj praavoj ol cedi al la tuja aĉettento kiam oni eniras butikon. Se ĉiuj loĝantoj de disvolvigitaj landoj konsentus malaltigi sian konsumo-nivelon, tiam eblus disvolvigigi evolulandojn ĝis meza nivelo. Male abismo inter riĉaj kaj malriĉaj landoj pliiĝos.

La tuja kontraŭa argumento estas ke neniu volas malpli konsumi. Tio ne estas certa! Ekzemple pri nutraĵoj. Antaŭ nur du aŭ tri generacioj abunda nutraĵo estis la vera signo de riĉeco. Nutraĵelspezo estis la ĉefa elspezo de ĉiu familio, ĉu riĉa aŭ ne. Tiam

riĉuloj estis dikaj kaj malriĉaj maldikaj. Nuntempe estas male. Oni ŝajne opinias ke estas pli saĝe malpli manĝi por esti bonsana kaj aspekti pli eleganta. Tamen oferto de nutraĵoj neniam estis pli abunda.

Same, estus ankaŭ pli saĝe posedi nur kelkajn bonkvalitajn vestojn anstataŭigotajn nur kiam ili estos eluzitaj ol havi ŝrankojn plenplenaj de malmutekostaj vestoj, rapide eksmodaj, kiujn oni pro tio ĵetos. Samkiale estus verŝajne pli inteligente posedi bonkvalitan veturilon ol nepre voli akiri plej novan modelon. Ĉar vere estas ke nur kelkaj aspekto-detaloj, kaj neutilaj akcesoraĵoj diferencigas tiun novan modelon de la malnova. Ĉar la konstruanto-celo estas rapide elmodigi por aĉetigi. Eblas proponi multajn tiajn ekzemplojn....bedaŭrinde sen konvinki iujn ajn.

Kial? Ĉar ekonomikistoj nin konvinkis ke homaj socioj nepre devas ĉiam multe pli konsumi por plena dungiteco kaj ĉies bonsaneco. Ili opinias ke ni aŭ kresku aŭ mortu. Tia argumento grave impresas tiujn, kiuj kredas ke ekonomiko estas vera scienco.

Sed oni komprenas nek, kial riĉuloj devas pli kaj pli konsumi dum malriĉuloj devas malpli konsumi, nek kial oni devas fabriki nedaŭrajn malmultekostajn varojn – krom se temas pli konsumigi nin. Denove ni pripensu la ekzemplon de veturilo. Se oni povus ŝanĝi sian aŭton nur post okjara uzado anstataŭ post dujara – ĉar pli solida, malpli difektebla – oni povus verŝajne aĉeti iun pli multekostan. Tiel oni ŝparus krudmaterialojn. Kaj por lukti kontraŭ senlaboreco, ĉu ne estus oportune pli saĝe laborigi homojn anstataŭ robotojn?

**“Temas nur pri limigi
sian konsumadon laŭ
sia vera bezono.”**

Fakte, ekonomiaj fakuloj nur studas agantajn sistemojn, ili ne povas eltrovi novajn. Tion konsumontoj devos fari. Do imagu denove socion en kiu viaj najbaroj, kiel vi, anstataŭigus sian aŭton nur kiam ĝi ne plu estas riparebla, en kiu homoj aĉetus konvenajn komfortajn elegantajn vestojn laŭuze, ne laŭmode, en kiu ekipaĵaro estus daŭrigebla kaj riparebla. En tia socio, vi ne bezonus ĉiam paradi kun nova aŭto, novaj vestoj, lastaj laŭmodaj aĵoj. Vi ne bezonus gajni pli kaj pli da mono por mirigi aliajn homojn per viaj elspezoj. Vi certe estus malpli streĉitaj kaj pli feliĉaj.

**“It is only about
limiting one’s
consumption to one’s
true needs.”**

Sed kiamaniere ebligi tian progreseman socion?

Konsumantoj certe ne ŝatos malpli konsumi sen kialo. Ili bezonas tre grandan motivadon pro tio. Laŭ mia opinio nur nova moralo povas ŝanĝi ilian vivmodelon. Tian novan moralon mi proponas al vi por instrui al viaj genepoj. Temas nur pri limigi sian konsumadon al sia vera bezono. Kial? Ĉar ĉiu moralo, ĉiu filozofio

"Mi alparolas viajn genepojn pere de vi."

celas esti ĝi feliĉe. Ĉar fakte tro oftaj envioj malfeliĉigas homojn. Nu, en nuntempa amaskonsuma socio ĉiutage novajn enviojn naskas plendoj. Oni esperigas al la homoj, ke ĉiu nova aĉeto havigas al ili pli grandan feliĉon. Sed tia espero ne-longtempe daŭras post la aĉeto. Restas nur pagotaj tratoj kaj obseda bezono gajni pli da mono por denove senti aĉeto-plezuron. Tio agas kiel drogo kaj kondukas homojn ĝis konstanta streso kaj kelkfoje al korupto kaj kontraŭleĝaj agoj.

Male, en socio kie homoj ne plu estas monfebraj, pli kaj pli da ili bezonas malpli da posedaĵoj por senti sin feliĉa. En tia socio kutimaj malvirotoj kiel egoismo, envio, ŝtelo, perforto ktp malaperos dum tradiciaj moralaj valoroj revigligiĝos. Tia laŭnatura socio estos pli feliĉa.

Tio estas simpla nova moralo por viaj genepoj. Por esti pli feliĉa, malpli konsumu. Ju malpli vi dependos de viaj envioj, despli vi estimos vin. Valorigu estaĵon pli ol ŝajnon. Tio estas respekti sin mem. Tiel agante vi faros ke malriĉuloj vivos en pli bona stato kaj partoprenos al la savo de la tero. Samtempe vi igos ke malriĉuloj pluvivos kaj ke la planedo estos savita. Tiel vi respektos ĉiujn aliajn surterajn vivantojn.

Temas pri simpla sed ege malfacila nova moralo. Homoj bezonas longe cerbumadi pri tio antaŭ ol esti konvinkitaj de tia ideo. Pro tiu kialo mi alparolas viajn genepojn pere de vi. ★

Memprezento de Yvan Serve:

Mi loĝas en Nouméa, la ĉefurbo de Nov-Kaledonio, dum 35 jaroj. Nun 75-jaraĝa, mi observas miajn genepojn simplanime konsumi multajn vestaĵojn kaj ĉiajn ilojn: ludilojn, sportilojn, fotilojn, komputilojn, ktp.

Mi verkis tiun tekston en 2006, antaŭ la nuntempa monda ekonomia krizo. Pro la fakto ke mi nur eklernis Esperanton en marto 2007, mia traduko bezonis profundajn korektojn de mia amiko Gérard Manseil.



Raportoj el

Vizito el Japanio

Zyun'iti kaj Noriko Sibayama feris en Nov-Zelando, kaj antaŭ sia vojaĝo hejmen al Japanio decidis viziti la Aŭklandan Esperanto-Societon. La societo kutime renkontiĝas ĉiun unuan kaj trian merkredon en monato, sed por la eksterlandaj vizitantoj aranĝis specialan kunvenon. La gastiginto, Howard Gravatt, preparis multe da manĝaĵoj por ĉiuj. Alia gasto estis Alexandrine Tonnerre el Nov-Kaledonio, kiu de tempo al



tempo pasigas tempon en Aŭklando. Maldekstre al dekstre: staras Dennis Pease kaj Donald Bowie, sidas Alexandrine Tonnerre, Ivan Pivac, Bradley MacDonald, Ian Jones, Zyun'iti Sibayama, Jean Hatch, Noriko Sibayama kaj Howard Gravatt. Faris la foton Chris Krägeloh. ★

Vizito de interlingvistika paro



Dufoje vizitis al Aŭklando la bonekonata interlingvistika paro Detlev kaj Wera Blanke el Germanio. Ili vojaĝis al la norda kaj suda insuloj de Nov-Zelando kaj ĉeestis Esperanto-kluban vesperon antaŭ ilia vojaĝo hejmen. Tie, ili parolis al ni pri la graveco de lingvosciencoj por la Esperanto-movado. Por ke neesperantistoj serioze konsideru nian lingvon, ni devas montri kaj detale dokumenti ke Esperanto posedas ĉiujn aspektojn de vigla lingvo. Detlev kaj Wera publikigis multe pri interlingvistiko kaj esperantologio, kaj mi [Chri Krägeloh] ĝuis tre plaĉajn konversaciojn kiam mi montris al ili la pejzaĝajn belecojn de la norda parto de nia urbo.

Esperantio

Vizito de francaj esperantistoj

Francaj esperantistaj geedzoj vizitis Wellington en februaro de 2009. Jen en la foto Gwenda Sutton (maldekstre) kaj David Ryan (mez-dekstre) kun francaj vizitantoj ĝuas vazon da bona sudinsula vino en *Backbenchers*, bone konata ĉefurba trinkejo kie niaj plej amataj politikistoj aperas kiel marionetoj. ★

Ero de David Ryan



Visit by French Esperantists

A French Esperantist couple visited Wellington in February 2009. In the above, Gwenda Sutton (left) and David Ryan (centre right) with the French visitors enjoy a glass of nice South Island wine in *Backbenchers*, a well-known Wellington pub, where puppets of our favourite politicians are displayed. ★

Contribution by David Ryan

Dekstre:
Ĉe la kluba vespero de Aŭklanda Esperanto-Societo. Maldekstre al dekstre staras Chris Krägeloh, Wera Blanke, Bradley McDonald, Brian Fox, kaj Jackie Fox.



Leteroj al ESK

Kara Miranda!

Mi ĵus ricevis mian ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*. La lasta novaĵobulteno, kiun mi ricevis, estis antaŭ 40 jaroj – kia diferenco! Nun mi revivigas mian Esperanton, kiun mi ne uzis dum tiuj samaj 40 jaroj. ESK donos sendube al mi multe da ekzerco. Kiaj belaj koloroj! La artikoloj ankaŭ estas tre interesaj.

[Al Kam Lee: Mi vizitis la monton *Napier* antaŭ multaj jaroj; sed tiam ĝi estis okcidente de Melburno.]

Multan dankon al vi kaj al viaj helpantoj (se vi havas iun ajn).

Bondezirojn, Ron Ritchie. ★

“What beautiful colours! The articles are also very interesting.”

“Kiaj belaj koloroj! La artikoloj ankaŭ estas tre interesaj.”

**ESK
bonvenigas
leterojn al la
redaktoroj kaj
respondojn al
antaŭe aperigitaj
artikoloj.**

Dear Miranda!

I have just received my copy of *Esperanto Sub la Suda Kruco*. The last news bulletin I received was 40 years ago – what a difference! I am “reviving” my Esperanto at the moment, which I haven’t used for the same 40 years. ESK will certainly give me plenty of opportunities to practice. What beautiful colours! The articles are also very interesting.

[To Kam Lee: I visited Mount Napier many years ago; but back then it was west of Melbourne.]

Many thanks to you and your assistants (if you have any).

Best wishes, Ron Ritchie. ★

2010 Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto



Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejoj de la 11a ĝis la 25a de januaro 2010

- kursoj por ĉiuj niveloj - kaj speciala kurso por infanoj
- vizito la Hibernianoj, la Operadomon, kaj la plejbon de Manlio
- ekskursu la ekzotikajn faŭnojn kaj florojn de Aŭstralio
- ĉiuj, babulo kaj sociaj kantoj kun esperantistoj el la tuta mondo
- ebrosu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
- ekskursu al la kofoj kaj kavernoj de la magiaj Bluj Montoj
- partoprenu la viglan noktan eliron de Sidnejo - per Esperanto

<http://aesk.esperanto.org.au>

Planoj por nia kursaro en Sidnejo en januaro 2010 progresas, kaj tri elstaraj instruistoj estas jam konfirmitaj. La eksterlandaj instruistoj estos Julián Hernández el Kubo kaj Sabine Trenner el Germanio. Se eblas, planu ke vi estos en Sidnejo ekde la 10a ĝis la 23a de januaro 2010, kaj instigu ankaŭ komencantojn.

Kotizlistoj estas videblaj en la retejo de AEA:
<http://aesk.esperanto.org.au/>

Kaj ne forgesu, ke por daŭrigi la ĝuadon de Esperantio, eblas iri poste al la nov-zelanda kongreso, kiu okazos ekde la 26a ĝis la 29a de januaro en la ĉefurbo, Wellington.

The Australian Esperanto Congress 2009

Will be held at Ursula Hall in the Australian National University, Canberra during the last weekend of November (27-30), with a post-congress until 3 December at the same venue.

Please announce your topic if you would like to give a talk in Esperanto. For more information please contact Huigh Malcolm at:
huighm@gmail.com

Esperanto en Sudaŭstralio proponas al vi

La sudaŭstraliaj esperantistoj produktis novan Esperanto-poŝtkarton. Ĝi montras mapon de Aŭstralio kun portretoj de niaj plej famaj Esperanto-verkistoj. Dorsflanke estas klarigo: "Ses aŭstraliaj verkistoj en Esperanto" kaj "Six Australian writers in Esperanto".

Por viaj Esperanto-amikoj la poŝtkarto estos interesa surprizo, por neesperantistaj ricevontoj eble kaŭzo al pli serioza konsidero de nia lingvo. Ĝi sendeblas al eksterlando anstataŭ ordinaraĵ turismaj kartoj kaj eĉ kiel jarfina bondezirkarto. Kune kun libro(j) de iu(j) el la prezentitaj verkistoj ĝi estos neĉiutaga donaco.

Unu ekzemplero kostas AU\$0,80. Ĉe mendoj de 25-99 ekzempleroj vi pagos po AU\$0,60 kaj de 100 menditaj ekzempleroj la kosto de unuopaj kartoj iĝas AU\$0,50. Al la prezo aldoniĝas la sendokostoj. Pri viaj mendoj bonvolu kontakti al:

S-ino Audrey Felby
6 Dorset St.
Semaphore Park, SA 5019
Aŭstralio

Tel.: (+61) 08 8242 1460
Interrete: audrey100@iprimus.com.au



Ses aŭstraliaj verkistoj en Esperanto.
Six Australian writers in Esperanto.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice President
esk@esperanto.org.au

Donald Rogers | Treasurer
dero2648@clear.co.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@whoosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

P.O. Box 339
Pascoe Vale South
Vic 3044
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

John Abood | Dir. of Administration
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Tim Wade-Ferrell | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au
(casual vacancy) | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto



Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejo!

de la 11a ĝis la 23a de januaro 2010

- komforta loĝado en la urbocentro de Sidnejo
- kursoj por ĉiuj niveloj – kaj speciala kurso por infanoj
- vizitu la Havenponton, la Operodomon, kaj la plaĝon de Manlio
 - ekkonu la ekzotikajn faŭnon kaj florojn de Aŭstralio
 - ludu, babilu kaj societumu kun esperantistoj el la tuta mondo
- eltrovu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
 - ekskursu al la klifoj kaj kavernoj de la magiaj Bluaj Montoj
 - partoprenu la viglan noktan vivon de Sidnejo – per Esperanto



<http://aesk.esperanto.org.au>